WIKIPEDIA

Uffizi

La **Galerio Uffizi** (en itala: *Galleria degli Uffizi*, itala prononcado: [ˌgalleˈria deʌʌi ufˈfitsi]) estas muzeo en Florenco, Italio. Ĝi estas unu el la plej malnovaj kaj el la plej multfamaj artmuzeoj de la okcidenta mondo.

Vido de vestiblo. La muroj estis origine kovritaj per tapiŝoj.

Enhavo

Historio
Selekto
Referencoj
Eksteraj ligiloj

Plafonaj freskoj en la ĉefa koridoro.

Historio

La konstruado de la palaco estis komencita fare de Giorgio Vasari en 1560 por Kozimo la 1-a de Mediĉo kiel la oficejoj por la florentinaj magistratoj - tial la nomo "ufizi" ("oficoj"). Konstruado estis daŭrigita al la dezajno de Vasari fare de Alfonso Parigi kaj Bernardo Buontalenti kaj finiĝis en 1581. La *cortile* (interna korto) estas tiel longa kaj mallarĝa, kaj malferma al la Arna Rivero ĉe ĝia malproksima fino tra dorika ekrano kiu markas la spacon sen blokado, kion arkitekturaj historiistoj[1] traktas kiel la unuan normaligita pejzaĝa strato de Eŭropo. Vasari, pentristo same kiel arkitekto, emfazis la perspektivan longon proksime de la kontinuaj tegmentaj kornicoj de la egalaj fasadoj, kaj nerompitaj kornicoj inter etaĝoj kaj la tri kontinuaj ŝtupoj sur kiuj la palaco-frontoj staras. La niĉoj en la pilastroj kiuj alternas kun kolonoj pleniĝis per skulptaĵoj de famaj artistoj en la 19-a jarcento.

La *Palazzo degli Uffizi* alportis kune sub unu tegmenton la administrajn oficojn, la tribunalon kaj la ŝtatarkivon (*Archivio di Stato*). La projekto kiu estis planita fare de Kozimo la 1-a de Mediĉo, Grandduko de Toskanio, aranĝis ĉefajn artaĵojn en la Medici-kolektoj sur selektadon de la elstaraj majstraĵoj en kolekt-ensemblo kiu estis ĉefa allogaĵo de la Grandioza Turneo kiun faris gravaj veturantoj.

Tra la jaroj, pliaj partoj de la palaco evoluis en loko por multaj el la pentraĵoj kaj skulptaĵoj kolektitaj de la Medici familio aŭ komisiita per ili. Laŭ Vasari, kiu estis ne nur la arkitekto de la Uffizi sed ankaŭ la verkinto de *Vivoj de la artistoj*, publikigita en 1550 kaj 1568, artistoj kiel ekzemple Leonardo da Vinci kaj Mikelanĝelo kolektis ĉe la Uffizi "por beleco, por laboro kaj por distro."

Post kiam la domo de Medici estis estingita, la artaj trezoroj restis en Florenco laŭ esprimoj de la fama *Patto di famiglia* negocita fare de Anna Maria Luisa, la lasta Medici-heredantino; ĝi formis unu el la unuaj modernaj muzeoj. La galerio estis malferma al vizitantoj per peto ekde la 16a jarcento, kaj en 1765 ĝi estis oficiale malfermita al publiko.

Pro ĝia enorma kolekto, kelkaj el ĝiaj verkoj estis en la pasinteco transdonitaj al aliaj muzeoj en Florenco - ekzemple, kelkaj famaj statuoj al la Palaco Bargello. Projekto estas nuntempe survoje por vastigi la ekspoziciejon de la muzeo en 2006 de proksimume 6,000 m² (64,000 ft²) ĝis preskaŭ 13,000 m² (139,000 ft²), permesante publikan spektadon de multaj artaĵoj kiuj kutime estis en stokado.

En 1993, aŭtobombo eksplodigita en *Via dei Georgofili* difektis partojn de la palaco, mortigante kvin homojn. La plej severa difekto estis al la Niobe ĉambro kaj klasikaj skulptaĵoj kaj neoklasika interno, kio estis poste reestigita, kvankam ĝiaj freskoj estis difektitaj preter riparo. La identeco de la bombisto aŭ bombistoj estas nekonata, kvankam ĝi preskaŭ estis certe atribuebla al la Sicilia Mafio kiuj estis engaĝita pri periodo de terorismo en tiu tempo.

Hodiaŭ, la Uffizi estas unu el la plej popularaj vidindaĵoj de Florenco. En ĉefsezono (precipe en julio), atendadoj povas esti ĝis kvin horoj. Vizitantoj kiuj rezervas bileton anticipe havas altagrade pli mallongan atendon. Biletoj ankaŭ povas esti aĉetitaj de pli malgrand-uzita biletfenestro ĉe la Preĝejo Orsanmichele kiu servas multoblajn muzeojn.

Komence de aŭgusto 2007, Florenco estis kaptita de granda pluvego, kaj la galerio estis parte inundita, kun akvo likanta tra la plafono, kaj la vizitantoj devis esti evakuitaj. Ekzistis multe pli signifa inundo en 1966 kiu difektis la plej multajn el la artaĵkolektoj en Florenco grave, inkluzive de la Uffizi.

Selekto

Simone Martini
Anunciacio, 305 x 265 cm

Giotto di Bondone
Ognissanti Madonna, 325 x 204 cm.

Gentile da Fabriano
Adorado de la Magiistoj, 300 x 282 cm.

Fra Angelico
Kronado de Virgulino, 112 x 114 cm

Masaccio
Madona kaj Sankta Anna, 175 x 103 cm.

Lorenzo Monaco
Adorado de la Magiistoj, 115 x 177 cm.

Sandro Botticelli
Naskiĝo de Venuso, 173 x 279 cm.

Sandro Botticelli
La Printempo, 203 x 314 cm.

Sandro Botticelli
Adorado de la Magiistoj, 108 x 173 cm.

Sandro Botticelli
Adorado de la Magiistoj, 111 x 134 cm.

Piero della Francesca
Dukoj de Urbino, 47 x 66 cm.

Filippo Lippi
Madona kaj Infano kun Anĝelo, 95 x 64 cm.

Leonardo da Vinci
Adorado de la Magiistoj, 243 x 246 cm.

Leonardo da Vinci
Anunciacio, 98 x 217 cm.

Verrocchio & Leonardo da Vinci
Bapto de Kristo, 177 x 151 cm.

Giovanni Bellini
Sakra Alegorio, 73 x 119 cm.

Piero di Cosimo
Perseo liberiganta Andromeda, 70 x 123 cm

Andrea Mantegna
Adorado de la Magiistoj, 86 x 162 cm.

Parmigianino
Madona de longa kolo, 216 x 132 cm.

Tiziano
Venuso de Urbino, 119 x 165 cm.

Tiziano
Flora, 80 x 64 cm.

Rafaelo
Madona de la kardelo, 107 x 77 cm.

Mikelanĝelo
Doni Tondo, Diametro 120 cm.

Rafaelo
Papo Leo la 10-a kaj familio, 154 x 119 cm.

Giorgione
Juĝo de Salomono, 89 x 72 cm.

Paolo Uccello
Batalo de San Romano, 182 x 220 cm.

Giorgione
Mosea Juĝo, 89 x 72 cm.

Caravaggio
Oferbuĉado de Isaako, 104 x 135 cm

Caravaggio
Meduzo, Diametro 55 cm.

Correggio
Ripozo survoje al Egipto, 124 × 107 cm.

Rogier van der Weyden
Lamentado de Kristo, 96 x 110 cm.

Albrecht Dürer
Adorado de la Magiistoj, 99 x 114 cm.

Hans Memling
Madonna and Angels, 76 x60 cm.

Francisco Goya
Portreto de María Teresa, 83 x 62 cm.

Pieter Paul Rubens
Triumfo de Henriko la 4-a en Parizo, 380 x 692 cm.

Diego Velázquez
Memportreto, 104 x 83 cm.

Caravaggio
Juna Bakkxo, 95 x 85 cm.

Agnolo Bronzino
Portreto de Eleanora de Toledo, 115 x 96 cm.

Rembrandt
Portreto de Johano Komenio, 104 x 86 cm.

Rembrandt
Memportreto, 74 x 55 cm.

Hugo van der Goes
Portinari Triptiko, 253 x 304 cm.

Albrecht Altdorfer
Martirado de Sankta Floriano, 76 x 67 cm.

Anthony van Dyck
Portreto de Karlo la 5-a, 191 x 123 cm.

Paolo Veronese
Martirado de Sankta Justina, 103 x 113 cm.

El Greco
Sankta Johano kaj Sankta Francisko, 110 x 86 cm.

Referencoj

1. ↑ Sigfried Giedion, *Space, Time and Architecture* (1941) 1962 fig.17.

Eksteraj ligiloj

- Oficiala retejo (http://www.uffizi.it/)
- Nova muzeo, Oficiala retejo – The New Uffizi (http://www.nuoviuffizi.it/english/)
- Uffizi Gallery, Florenco ĉe Turismo InToscana (http://www.turismo.intoscana.it/intoscana2/export/TurismoRTen/sito-TurismoRTen/Contenuti/Elementi-interesse/Musei/visualizza_asset.html_753553155.html)
- Uffizi – Google Art Project (http://www.googleartproject.com/museums/uffizi)

Elŝutita el "https://eo.wikipedia.org/w/index.php?title=Uffizi&oldid=6966461"

Ĉi tiu paĝo estis lastafoje redaktita je 12:13, 23 maj. 2020.

La teksto disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 3.0 Neadaptita; eble aldonaj kondiĉoj aplikeblas. Vidu la uzkondiĉojn por detaloj.